

Norvega Esperantisto

N-ro 6
1993

3a periodo 60a (69a) jaro

☆ ESPERANTOBLADET



Abonu **monato** internaciajn revuojn!

El la enhavo:

Esperanto-nytt por disdonado	2
Ni surmerkatigu Esperanton!	3
Estraraj novaĵoj	5
Per trajno al Koreio? (al UK/IJK)	6
Kotizoj 1994	10
Abonu aliajn Esperanto-revuojn!	11
Språkforklaringer for de helt nye	16
Etimologio	17
Novaj libroj en la vendobretaro:	20



Karaj legantoj!

Alproksimiĝas ankoraŭ unu nova jaro - en kiu vi povos eble trajni al Koreio (vidu p.6), partopreni aranĝojn en eksterlando (p.5) aŭ aboni eksterlandajn revuojn (p.11), aĉeti novajn librojn (p.20) kaj certe pagi via(j)n kotizo(j)n (p.10).

Sendube vi ankaŭ legos "Norvega Esperantisto". Sed kia ĝi tiam aspektos, tio montriĝos.

DD

LEGACO UHLEN

akceptas petskribojn ĝis la jarfino, pro la malfruo de N.E.5.

Eraroj

en n-ro 5:

Dorsa paĝo: La poŝtgira numero de la klubo en Oslo estas 0805 5 15 22 77.

p.15: "CSB 80". Bedaŭrinde elfalis la dato: la 8a de decembro.

Cetere kelkaj lingvaj/skribaj fuĝetoj:

p.2, kol.1 3a linio demal-supre en la redakcia artikolo: fortikiĝi nian ejon

p.2, kol.2, 10a linio

demalsupre: Syd-Afrika

p.12, kol.2, 3 liniojn super la subtitolo "Kresko":

Miĥajlov.

Esperanto-nytt por disdonado

Ni forgesis en n-ro 5 informi al niaj norvegaj legantoj, ke vi ĉiam bonvenas mendi pliajn Esperanto-nytt. Ni nome krom-presigas ĝin 1500-ekzemplere por disdonado.

Vi povos do sekvi la ekzemplon de Olav Bjørnsrud, Kongsberg, kiu skribis al ni:

"Bonvole sendu al mi minimume dek* ekz. de E-nytt n-ro 2. Mia intenco estas sendi ilin al komunumaj institucioj - ekz. diversaj lernejoj kaj altlernejoj - Lågen loka radio - Friundervisningen [kleriga asocio] ktp. Mi havas kontaktulojn al kiuj mi deziras doni impulsojn. Lågen loka radio akceptas sendi kurson..... La lernejojn mi informas, kaj ankaŭ la kulturan direktoron de la komunumo."

* Ĝis 9 ekz. ni povas sendi por 7 kr.; ĝis 24 por 12 kr.; ĝis 48 por 20 kr. Ni estas dankaj por kovro de la afranka elspezo. - Red./Eksp.

PÅ NORSK

Bestill flere eks. av Esperanto-nytt for gratis utdeling! (Send gjerne et bidrag til portoutgiften.)

La ĉefartikolo ĉi-numera estas bazita sur norveglingva malneto de nia estrarano Bjørn Thuv:

Ne sub grenmezurilon*

Pluraj diras lastatempe ke ni devus surmerkatiĝi Esperanton pli bone: "La homoj ne komprenas kia bonega lingvo Esperanto estas", kaj "Tempas ke ni disvidigu pli da reklamo por la internacia lingvo". Tiuj kiuj esprimas tiaĵojn certe estas bonintencaj, sed ili faras kutiman eraron: ili identigas reklamon kun surmerkatiĝo. Sed bedaŭrinde estas maltre kredeble ke flugfolioj kaj anoncoj faros

konsiderindan kontribuon al atingo de nia celo - pliaj uzantoj de Esperanto.

Surmerkatiĝo en la moderna senco estas multe pli ol nura reklamo. Ĉi tiu nova fako efektive ampleksas ĉiom, ekde la unua ideo - pri internacia lingvo niakaze - ĝis serĉado de celataroj, evoluo de aparatoj por instruado kaj vendado, publikaj rilatoj kaj reklamo, kaj fine pritakso de

* "Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo." (Mat.5.15)



Norvega Esperantisto

ISSN 0029-361X

ESPERANTOBLADET

DUMONATA REVUO DE
NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
NORSK ESPERANTO-FORBUND

ELDONEJO ESPERANTO A/S
ESPERANTOFORLAGET A/S

Postgiro: 0803 5100300

Postgiro: 0809 5100318

Redaktis Douglas Draper.

Helppuntis Odin Roll-Hansen

Redakcio kaj ekspedejo:

Olaf Schous vei 18

N-0572 Oslo

Tlf. 22 35 08 94

Jarabono (1994): 70 kr.

Presis: Gero-data, Lørenskog

Peranto por Svedio: SEF, ĉe

Lisbet Andreasson, Södra

Rörum pl 455, S-242 94 Hörby

Telefon: 22 35 08 94

Adresse: Olaf Schous v. 18, N-0572 OSLO 5

Kontortid: mandag, torsdag 15.30-16.30
onsdag 14.30-15.30

Ĉefdelegito de UEA:

UEA-konto: espv-s

Kjell Gustavsen,

Rasmus Engers vei 10, 0956 OSLO 9

Postgiro 0808 5133293 Bankgiro 1609.08.5500.3

UEA-konto: norv-e

Turisma Servo de NEL

ĉe Agnar Fitjar

5240 Valestrandsfossen

Tlf. 56 39 42 71

Postgiro 0809 5100326

E-poŝto: u_draper_d@kari.uio.no (ĉeestas marde/vendrede post la 12a)

la vendado kaj nova adapto de la produktaro. Publikaj rilatoj temas pri ĝenerala kontakto kun la socio, kaj reklamo estas ĝci-konekse nur unu el pluraj moduloj aŭ rimedoj por atingi plian uzadon de Esperanto.

La historio montras ke Esperanto estas bona kaj taŭga internacia lingvo. Malgraŭ la registaraj persekutoj kontraŭ Esperantistoj, kaj malalta aŭ eĉ neniuj subvencio, milionoj da homoj lernis Esperanton. Restas nur tio, ke la ceteraj miliardoj da homoj ekuzu Esperanton en siaj eksterlandaj rilatoj!

500 novaj e-istoj?

Nu, ĝci-lastajo estas eble nur revo. Sed kelkaj pliaj adeptoj, por certigi kresketon, kaj eble ankoraŭ kelkaj pli, ne estus malbonvenaj. Ĝcu ni diru: 500 novaj esperantistoj en Norvegio en la daŭro de du jaroj?

La unua paŝo estas starigi klaran koncizan celon, kia ĝci tiu. Poste ni nur sekvu la modulojn de la moderna surmerkato, kaj por ĝciu modulo respondu la demandojn: Kio, kiu, kia, kial, kiam, kiel, kiom, kie?

NEL baldaŭ aranĝos seminaron pri ĝci tio, do ni ne bezonas uzi spacon tie ĝci.

Sed unu el tiuj moduloj - tiu pri kontakto kun la socio - devus funkcii la tutan temp-on, kaj tial ni komencu tuj. Kutime oni havas ian informan fakon por prizorgi tiaĵojn. Ĝcar ĝce ni estas nur unuopula responsulo, jam tro-ĝsarĝgita, la afero devas esti ĝciesaĵo.

Ĝci tial, karaj norvegaj esperantistoj: eluzu ĝcian eblon por disvastigi la bonan novaĵon pri nia internacia lingvo. Almetu faktojn, rezultaĵojn de esploroj, statistikaĵojn pri Esperanto. Korektu trovitajn erarojn. Kiel ekzemple aserton en ĝjus aperinta enciklopedio, ke Esperanton konstruis Zamenhof en 1887. La viva lingvo Esperanto ja estas multe pli ol la nudaj vortlisto kaj gramatiko de la Unua Libro.

Diskonigu ekzemplojn pri Esperanto en praktika uzado (kiajn vi trovas en nia norveglingva Esperanto-nytt). Trovu legontojn por la libroj pri Esperanto, kaj abonontojn por la revuoj. Sciigu al ne-esperantistoj pri tiu mondliteraturo kiu staras je dispono de lernintoj de la lingvo.

Ĝciam gravas niaj publikaj rilatoj. Ek!

[Esperantigis DD laŭ norveglingva malneto de Bjørn Thuv

Estraraj novaĵoj

Seminario pri strategio

La estraro planas aranĝi seminarion frue en 1994 por diskuti konkretan strategion por nia informado kaj por la evoluigo de nia ligo. Niaj finceloj ja estas difinitaj en la statuto, sed mankas survojaj celetoj (delmål), kaj necesas pli konscie prioritati, en situacio kun tre limigitaj homfortoj. Oni esperas povi kovri la vojaĝelspezojn de almenaŭ unu reprezentanton el ĉiu aktiva klubo, sed la amplekso de la aranĝo dependos de la grandeco de eventuala asigno el la legaco Uhlen.

Estonio: Ĉu subteno?

Post la vizito de la prezidento en Estonio ĉi-somere (vd. N.E. 4, p.7), la estraro esploras, kiel subteni la movadon en la ekonomia krizo tie. Ĝajnas laŭ letero de la Esperanto-Instituto de Estonio, kaj artikolo en revuo Esperanto (novembra) de la prezidento de la estona Esperanto-asocio, ke ili prefere ol ricevi monsubtenon volas stimuli reciprokan gastigadon, kaj la estraro esploras, ĉu tio povus enkadriĝi en programo de "Foreningen Norden" (Nordia Asocio).

Aranĝoj en eksterlando

Tampere, Finnlando: Internacia Esperanto-semajno 27.6 - 1.7.1994. Pliaj informoj ĉe Jukka Laaksonen, Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere.

Ĉebalta Esperantista Printempo, 12 km nordokc. de Koszalin, Pollando. 6. - 12. junio 1994. Prelegoj, konkursoj, E-vidbendoj ktp. Pliaj informoj en nia oficejo.

SUR LA SEKVANTAJ DU PAĜOJ el la eŭropa junulara revuo "Koncize" oferto pri pertrajna vojaĝo al Koreio - por tiuj kiuj volas vidi iom de la interaj landoj, kaj vojaĝi en maniero pli medindulga ol aviadilo.

- kaj en Norvegio

Konversacia kurso semajnfina. 14.- 16.1. '94. Gvidos Tamiko K. Nielsen. Kurso plene en Esperanto. Minimuma antaŭscio: bazaj gramatiko kaj vortprovizo. En arbara kaban-o, ĉ. 10 km de la centro de Asker, 25 km okc. de Oslo. Pro limigita spaco, nepre anoncu vin antaŭe (laŭeble frue). Multa neĝo, skiebloj. Kotizo: 400 n.kr. inkl. manĝaĵon. Duonpreze por studentoj, senlaboruloj k.s. Klubo E-ista en Oslo.

DD

kvin

La Granda Trajnvojaĝo




Per trajno de Moskva al la IJK en Koreio.

Ekde la unua anonco niaj planoj jam multe pli konkretiĝis. Evidentiĝis ke kelkaj rusoj ankaŭ planas iri trajne/ŝipe al Koreio. Ni do kunmetis la fortojn. Aliaj aŭdis pri la vojaĝo kaj proponis interesajn eblecojn. Ni ekz. estos bonvenaj en Krasnojarsk por la **ORienta Somera Esperanta Junulara Tendaro**, kiun la tieaj esperantistoj okazigos dum nia vojaĝo. Esperantistoj el Beijing invitis nin viziti ilian urbon. La ebleco por manĝi vere ĉine!

En la figuro sube vi povas vidi, kiam okazos ĉio. Notu bone, ke ankoraŭ ne ĉiuj datoj estas fiksitaj, sed la foriro je la 11-a de julio el Moskva kaj la alveno je la 30-a en Ch'onan estas. La aliaj datoj iomete dependas de la horaro de trajnoj, ŝipoj kaj de viaj deziroj.

Ni mense vojaĝu iomete:



Moskva: Antaŭ la foriro vi povos ĝui la faman urbon kun la Kremlin, la Ruĝa Placo kaj ĝia cirkaŭaĵo.

Moskva-Krasnojarsk: Unua parto de la trajnvojaĝo. La jenaj laborgrupoj estas antaŭvidataj: ĵonglado, muzikado, eksterenrigardado kaj **Esperanto-kurso por komencantoj**. Sciigu viajn neesperantistajn amikojn pri tiu ĉi ebleco. Nuntempe la trajnbileto de Moskva ĝis Beijing kun halto en Krasnojarsk kostas USD 155 (moskva prezo). En la trajno ni mem povos prizorgi manĝaĵojn kvankam ekzistas restoracia vagono.

ORSEJT: Vi ne bezonos kunporti tendon! Por malpli ol USD 50 vi ricevos manĝojn kaj tranoktadon dum tiu ĉi mezsiberia renkontiĝo en Krasnojarsk. situante meze inter Novosibirsk kaj Irkutsk, 4104 kilometrojn de Moskva.

Krasnojarsk-Beijing: Dua parto de la trajnvojaĝo. Vidu sub la unua parto.

Beijing (unua ebleco): Ĉi tie ni restos kelkajn tagojn por rigardi la urbon. Ni provos aranĝi tranoktadon ĉe esperantistoj. Dustela hotelo, bonaj manĝaĵoj kaj ekskursoj alikaze kostus proksimume po USD 35 tage.

UK en Seoul (dua ebleco): Vidu la oficialan informilon en ĉi tiu numero de *Koncize*.

Beijing-Koreio: Unue trajne (prezo nekonata, daŭro 10-15 horoj) ĝis la marbordo kaj poste ŝipe ĝis Inĉono (moskva prezo USD 100).

LJK: Vidu la oficialan informilon en ĉi tiu numero de *Koncize*.

Reiro al Eŭropo: Krom reiri per trajno vi ankaŭ povos refluĝi se mankas al vi tempo. Altsezona prezo de Amsterdam al Seoul estas proksimume NLG 1000. Tamen ne estas certe, ĉu dumsomere en la direkto Seoul-Amsterdam la bileto havas la saman prezon!

Kion fari nun?

Se vi interesiĝas pri la vojaĝo, kontaktu min kiel eble plej frue (almenaŭ antaŭ la fino de januaro), ĉar aĉeti kaj rezervi lokojn en la trajno oni devas fari jam monatojn antaŭe. Pripensu, ĉu vi ŝatus fari laborgrupon!

Jan van der Vliet

Hebriden 8

3524 EA Utrecht, Nederlando

(+31) 30-896224 (hejme)

(+31) 20-6821081 (laboreje)

(+31) 20-6826186 (fakse)

Kampademuloj! _____



Kiu interesiĝas pri instalo de "Eŭropa unuiĝo de Esperanto-kampademuloj"? Planataj estas komunaj kampadoferioj dum ĉiu jarsezono en tuta Eŭropo kun partoprenantoj el ĉiuj Eŭropaj regionoj. Alparolataj estu aĝogrupoj de senfamiliano al paroj ĝis familio kun ĉiesspecaj tendoj, karavanoj kaj loĝmobiloj.

Interesitoj anonciĝu ĉe: Lars Böhmer, Dahlerdyk 81a, D-47803 Krefeld, Germanio. Tel. (+49) 2151-20546

Norvega kroniko

BERGEN

La Esperantoklubo de Bergen kunvenis la 15an de novembro en la kutima klubejo - Møhlenpris bydelshus. Preleganto estis Arve Fitjar, kiu rakontis al ni pri Esperanto-kurso per komputilo. La kurso estas verkita de Michael Urban, kaj ĝi estas en la angla lingvo. Estis tre interese aŭskulti al Arve, kiu ankaŭ disdonis kelkajn foliojn kun ekzemploj de la kurso. Demonstri per maŝino ne eblis en nia ejo, ĉar por la uzo oni bezonas komputilon de la speco Macintosh. Tiaj instrumetodoj certe pli kaj pli invados nian Esperantan mondon.

Interesa programpunkto estis ankaŭ prezento de videofilmo per Agnar kaj Eli Fitjar, filmo kiun ili surbendigis en Valencio dum la kongressemajno.

Lingvan kvaronhoron gvidis Elna Matland; la taskoj estis ĉerpitaj el la gazeto "Eventoj", kaj antaŭe dissenditaj per nia kluba bulteno. Fine la prezidanto Ingebjørg Rambjør prezentis kelkajn punktojn de la estrara kunveno de NEL, i.a. tem-

is pri eventuala aranĝo de informa seminario.

Raportis Elna Matland

OSLO

Informbudo en instruista foiro

Fine de oktobro ni dum du tagoj deĵoris ĉe informbudo en instruista foiro "Østlandets lærerstevne", disdonante ĉ. mil flugfoliojn pri Esperanto kiel elektebla fako en la lernejoj. Samon ni faris ankaŭ lastjare. Multaj preterpasantaj instruistoj akceptis tion kion ni enmanigis al ili, sed planita prelego pri Esperanto ne okazis, pro manko de publiko. (Samhore oni ofertis dudekon da aliaj prelegoj!)

DD

KLUBAJ KUNVENOJ

La 15an de novembro

Post prezento de kelkaj informoj kaj proponoj ni spektis vidbende la filmon de Roman Dobrzyński el la jubilea jaro.

DD

La 7an de decembro

La prezidantino bonvenigis al ĉi tiu kunveno, en kiu celebriĝis la morgaŭa 80-

jara jubileo de Carl Støp-Bowitz. Otto Prytz faris festparoladon por la jubileanto. Li priparolis ĉion kion CSB faris por Esperanto kaj la multajn postenojn kiuj li havis, ekde sia esperantistiĝo jam en 1928.

C. Støp-Bowitz ankaŭ en la scienca kampo estas signifoplena persono, kaj ankaŭ tiurilate Otto Prytz priparolis lin kiel meritulon. La prezidantino transdonis al la jubileanto donacojn de Klubo Esperantista en Oslo kaj de la estraro de NEL, kaj de NEFA* li ricevis florojn kaj gratulon. C. Støp-Bowitz kore dankis pro la festvortoj kaj la donacoj.

Raportis Odd Kolbrek

* Norvega Esperantista Fer-vojista Asocio

Esperanto en radio

Ĉiun vesperon je la 22.30 (norvega vintra tempo). 200 m (mezaj ondoj) (ankaŭ alihore kaj -onde). Pola Radio.

Dimanĉe: Esperanto-aranĝoj
Lunde: salutoj k bondeziroj
Marde: la Esperanta gazetaro
Merkrede: Pollando hodiaŭ
Ĵaŭde: kultura magazino
Vendrede: homoj k problemoj
Sabate: leterkesto/intervuoj

Kaj gravas skribi al la redakcio. (Pro maltra da leteroj malaperis la elsendoj de Svisa Radio.) Adreso: Pola radio, Esperanto-redakcio, Skrytka 46, PL-00-950 Warszawa

No kryp Dag og Tid ut av sitt gode skinn

Dag og Tid – verdas einaste riksdekkjande nynorskavis – har kledd seg i nytt format og ny form.

Men vi skal framleis vere den uavhengige og uredde avisa som tør å tale Akersgata midt i mot.

Intuelt mannsald, store liner, pikante detaljar.

Frisk frå kjelda, kvar torsdag.

Kan sendes ufrankert i Norge. Dag og Tid vil betale portoen.

Svarering
Avtalnr. 120/120/omb
Rel.nr. 1 30000

Dag og Tid
Sentrum
0109 Oslo

Ja eg ønskjer å tinge Dag og Tid
 ½ års abonnement kr 420,-
 ¼ års abonnement kr 225,-

Namn:

Adr.:

Postnr:

Poststad:

Tlf.:

Du kan òg fakse til 22 41 42 10 eller ringje 22 11 14 55

(inter-san-ga anonco)

Kotizoj 1994

En 1994 la kotizoj de NEL plialtiĝos, laŭ decido de la landa kunveno fine de majo en Skjeberg. La novaj kotizoj por rektaj membroj estas:

ordinaraj -	150 kr.
junulaj -	100 kr.
samdomaj -	50 kr.
junaj samdomaj -	20 kr.

(Samdomaj membroj ne ricevas apartan ekzempleron de Norvega Esperantisto aŭ aliaj presaĵoj, sed havas voĉdonan rajton, kaj kontribuas al la statistiko.)

dumvivaj -	2000 kr.
- " - > 60 jaroj:	1000 kr.

- pageblaj al NEL, poŝtĝiro 0803 5 100 300.

Klubaj membroj informiĝu ĉe la koncerna klubo. (La kluboj transsendu al NEL por ĉiu membro respektive 140, 90, 50 kaj 20 kr. por la supraj kategorioj.)

*

Laŭ la statuto de NEL oni antaŭpagu la kotizon. Pro tio ni petas niajn membrojn ne prokrasti pagi sian kotizon. Tiam ni ne bezonos uzi tempon kaj monon por urĝigaj leteroj. Dankon!

PA NORSK

Vennligst betal kontingenten raskt. Da sparer du oss for ekstraarbeid med purringer. Girokort er vedlagt for direkte medlemmer.

UEA-kotizoj

Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). Rajtigas al 45-guldena rabato en UK-kotizo. MJ(-T): 145 kr.

Simpla abono al la revuo "Esperanto". SA 220 kr.

Membro-Abonanto. MA(-T) = MJ(-T) + SA.

Abono al la revuo Kontakto, Kto 145 kr.

Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membr-econ en UEA). SZ 730 kr.

Patrono de TEJO: por subteni TEJO (ne inkluzivas membr-econ); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO. PT 435 kr.

Kotizojn por UEA pagu al "UEA, norsk avdeling", poŝtĝiro 0808 5 13 32 93, aŭ al bankĝirokonto 1609.08.55003 (Prizorganto Kjell Gustavsen.)

Abonu aliajn Esperanto-revuojn!

Alproksimiĝas denove jarŝanĝo kaj nova abonjaro. Esperanto estas ja lingvo internacia, farita por internacia komunikado. Do ni legu internaciajn revuojn! Provabonu unu!

Kaj via loka klubo aŭ grupo certe povos aboni plurajn. (Se ne estas loka grupo ĉe vi, petu de la oficejo adresojn de proksimaj membroj kun kiuj vi povos kunaboni!)

La revuo **ESPERANTO** estas la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĝi enhavas artikolojn pri la movado en diversaj landoj, pri kongresoj kaj pri strategio. Ĝi informas ankaŭ pri novaj libroj en Esperanto, ofte kun recenzo. Lingvaĵe unu el la plej fidindaj revuoj. 11 x 24 paĝoj jare, en formato preskaŭ A4. 220 kr.

HEROLDO DE ESPERANTO
Raportilo pri la Esperanta movado. Precipe novaĵetoj el diversaj landoj, ofte kun bildoj. Ankaŭ recenzoj kaj foje debato. 16 x 4 p. en granda gazeta formato, A3. 155 kr.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA SENDEPENDA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

Esperantistaj viktimoj de la milito en Kroatio



La milito en Kroatio estas unu el la plej tragikaj konfliktoj de la 20-a jarcento. Ĝi okazis inter 1991 kaj 1995, kun granda nombro de viktimoj, inkluzive de Esperantistoj. La konflikto komencis kiel disputo pri teritoriaj demandoj, sed evoluis al plena milito. Multaj Esperantistoj, kiuj estis aktivaj en la movado, estis viktimoj de la milito. Ili estis forpelitaj de siaj hejmoj, mortigita, aŭ forportita. La konflikto finis kun la signado de la Daytonaj akordoj en 1995, sed la rezultoj estas kontroversaj. Multaj Esperantistoj daŭre vivas en refugioj aŭ en landoj eksterlande, kaj ili daŭre aktivigas la Esperanto-movadon.

Harmoniligo de la UEA-rimedo

La harmoniligo de la UEA-rimedo estas unu el la plej signifaj eventoj de la Esperanto-movado. Ĝi okazas ĉiun jaron kaj estas dediĉita al la harmoniligo de la rimedoj de la UEA. Ĝi estas organizita de la UEA kaj estas unu el la plej grandaj eventoj de la movado. Ĝi okazas en diversaj landoj kaj estas dediĉita al la harmoniligo de la rimedoj de la UEA. Ĝi estas unu el la plej signifaj eventoj de la Esperanto-movado. Ĝi okazas ĉiun jaron kaj estas dediĉita al la harmoniligo de la rimedoj de la UEA. Ĝi estas organizita de la UEA kaj estas unu el la plej grandaj eventoj de la movado. Ĝi okazas en diversaj landoj kaj estas dediĉita al la harmoniligo de la rimedoj de la UEA.

Novo 2025, aprilo, aŭgusto

Internacia Sendependa Gazeto por la Esperanto-Movado

LIBRO PRI LIBROJ

La libro 'Libroj pri libroj' estas unu el la plej signifaj verkoj de la Esperanto-movado. Ĝi estas dediĉita al la bibliografio de la Esperanto-movado kaj estas unu el la plej grandaj verkoj de la movado. Ĝi enhavas listojn de libroj, kiuj estas dediĉitaj al la Esperanto-movado, kaj estas unu el la plej signifaj verkoj de la movado. Ĝi estas dediĉita al la bibliografio de la Esperanto-movado kaj estas unu el la plej grandaj verkoj de la movado.

La plej ofta...

Eventoj

Internacia movada gazeto por aktivaj esperantistoj!
Aperas dusemajne, legata en pli ol 40 landoj...
Petu senpagan provokzempleron:
EVENTOJ, pk. 87. H-1675 Budapest, Hungario

Monato

INTERNACIA MAGAZINO EN ESPERANTO

MONATO aliflanke, estas nenovada magazino, kun raportoj, artikoloj kaj debatoj pri politiko, ekonomio, kulturo, turismo kaj ĉiaj aferoj de la moderna vivo. Nenio estas tradukita: Ĉio estas verkita originale en Esperanto de loĝantoj de la koncernaj landoj. Ofte enestas ankaŭ novelo, ĉercoj, kaj krucvort-enigmo. 11 x 32 p. A4 259 kr.



VERDire. Ekologiisma gazeto. Raportoj kaj debatoj pri aktualaj temoj koncerne la vivmedion. 16 paĝoj A4. Vd. N.E. 1/91, p.24. 24 p. A4. 4 numeroj por 95 kr. Postĝiro (nur por norvegianoj): 0540 8253863.

EN ESPERANTO


8

EL POPOLA ĈINIO

EL POPOLA ĈINIO estas magazino plejparte pri la vivo en Ĉinio, kun altkvalitaj koloraj bildoj. 12 x 64 p. 26 cm (iom malpli ol A4). 182 kr. por unu jaro. (Plurjara abono ne plu eblas.)

LITERATURA FOIRO. Organo de LF-koop, Svislando. Kultura revuo en Esperanto. Kunlaboras en la redakta stabo longa vico da famaj Esperantaj verkistoj el diversaj eŭropaj landoj. Lingve kaj enhave altkvalita.

6 x 56 p. A5 185 kr.



FONTO. Beletra revuo. Tradukoj kaj originalaj poezio kaj prozo. Iĝis pli varia post ekfunkcio de la nova redaktoro, Gerrit Berveling. Ĉ. 10 x 36 p. Iomete pli larĝa ol A5. 148 kr.

LA ESPERO (Svedio) estas iom pli ampleksa ol nia N.E., kaj ĝi donas multajn utilajn informojn pri la movado en nia najbara lando. 6 x 16 p. preskaŭ A4. 180 kr.

JUNA AMIKO. Por lernejoj kaj aliaj lernantoj (kaj ties gvidantoj). Redaktoro Stefan McGill. 4 x 24 p. A5. 45 kr.

juna amiko

93/3

Somerfina
simfonio



Internacia
Kvaronjara
Lerneja
Esperanto-
Revuo

KONTAKTO

numero 129 (1992:3)

KONTAKTO, revuo eldonita de TEJO*. Artikoloj ne pri la Esperanta movado, sed pri la mondo kaj la vivo. Tamen ĝenerale ne pri aktuala politiko k.s. kiel en Monato. Precipe por junuloj kaj lernantoj. Kelkaj el la artikoloj en facila Esperanto, kun uzo de nur la 520 aŭ 1000 plej oftaj vortoj de la lingvo.

Dumonata 16 p. A4. 145 kr.

Rektaj membroj de TEJO (do rektaj junulaj membroj de UEA) ricevadas ĝin sen aparta pago.

*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Thomas Pusch, estrarano de TEJO pri informado, skribas en cirkulero al ni:

... dum la lasta jaro Kontakto ĝis ĝis enhave kaj grafike en tre pozitiva direkto. ... ĝi estas tre bona kaj viva instrua materialo por E-kursoj, inda je rekomendo por ĉiuj komencantoj.

UEA, kiu eldonas ĝin interkonsente kun TEJO, decidis plueldoni ĝin kondiĉe ke ĝis fino de 1994 ĝi iĝu finance ekvilibra. La malapero de la sola socikultura gazeto por gejunuloj en Esperanto signifus perdon de servo, kiu akompanas nin de 30 jaroj ... [La ĉi-apuda] anonco estas parto de nia kompanjo por savi Kontakton.

la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

Abonu ĉe via
UEA-kotizperanto aŭ
petu provekzempleron
kontraŭ unu internacia
respondkupono ĉe TEJO,
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam,
Nederlando.



TEJO TUTMONDE. La oficiala gazeto de TEJO. Ĝi iĝis vere bela kaj leginda lastjare. 15 gld. ĉe UEA (1993). Ĉiuj individuaj membroj de TEJO (= junulaj membroj de UEA) - kaj patronoj de TEJO - ricevas ĝin sen aparta pago.

SCIENCA REVUO estas la organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). (Abono inkluzivas membrecon.) Ĝi estas popularscienca revuo abonebla por ĉiuj, kiuj ŝatas legi pri sciencaj temoj kaj novaĵoj - ankaŭ ekz. lingvosciencaj. 4 x 30/40 p. A5. 137 kr.


ROK'GAZET'. Pri rokmuziko. 28 p. A4. Bele kompostita. Bildoj. 4 numeroj por 35 gld. aŭ 100 FF (1993-prezo).

ROK'GAZET'

KVINPINTO. Organo de la nordiaj Esperanto-junularoj. 4 x 12 p. A5. Junulaj membroj de NEL ricevadas ĝin sen aparta pago.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO. Ĝin oni ricevas kiel membro de ILEI - la Internacia Ligo de Esperanistaj Instruistoj. (Membreco: 100 sv. kr. Pagu al la Instruista Sekcio de NEL, poŝtĝiro 0803 5 74 72 58.)

tejo
tutmonde
tutmonda esperantista junulara organizo



Intervjuo:
Bertilo

P5 en Katalunio
Skandalo

Jarraporto de nia
Estraro

n-ro 361

julio-septembro 1993

ĵuro 11

MONDA FORUMO. Organo de Unesko-asocio Monda Agado. 4 x 16 p. A4. Membreco: 30 gld. (1993)

ETNISMO. Organo de Internacia Komitato por Etnismaj Liberecoj. 4 x ĉ 16 p. A4.

ASISTILO. Organo de ASISTI, interreligia asocio. 3 x 32 p. A4.

Kelkaj aliaj gazetoj kiujn ni ricevadas:

Dia Regno. Kristana (protestanta).

Sennaciulo. Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda (SAT).

La Skolta Mondo.

Tutmondaj Sciencoj kaj
Teknikoj. (ĉina)

TUTMONDAJ 世界科学技术

SCIENCŬ K TEKNIKOJ

Norda Prismo. Nordia kultura
revuo. Reaperis en 1991, post
plurjara foresto.

La Kancerkliniko. "Ajnista,
skandalema..."

Cetere multaj organoj de
landaj asocioj, ekz. la sveda
(vd. supre), la germana, la
nederlanda, la brita kaj la
slovaka, estas bonkvalitaj,
kaj enhavas multon interesan
por alilandanoj. Ni ricevas
la menciitajn, kaj multajn
aliajn, en nia oficejo,
interĉsanĉge kun N.E.

KIE MENDI?

Por ESPERANTO, KONTAKTO kaj
TEJO TUTMONDE (eldonaĉjoj de
UEA) pagu al la konto "UEA,
norsk avdeling"*, poĉstĉgiro
0808 5 13 32 93.

ĉCiujn aliajn revuojn
mendu ĉce Eldonejo Esperanto*
(= Esperantoforlaget),
poĉstĉgiro 0809 5 10 03 18.

*Adreso ne necesas sur enlanda
ĉgirilo.

PÅ NORSK

Hvis du kan lite esperanto,
og har vanskelig for å lese
det ovenstående, anbefaler vi
et abonnement på bladet
"Kontakt", som har artikler
med forskjellige vanskelig-
hetsgrader, eller et blad med
mange bilder, som El Popola
ĉCinio. DD


Proverboj petataj!

Nova kunlaborantino de Pola
Radio, en la Esperanto-
redakcio, estas Ewa Krach,
studento por aplikata
lingvistiko, kiu preparas
disertaĉjon pri proverboj.
ĉSi faras komparon de
proverboj en la lingvoj pola,
rusa, franca kaj Esperanta,
kaj precipe laŭ tri
strukturoj:

1. Ne A sen B, aŭ Kie A tie B
2. ĉCiu X havas sian Y.
3. La speco: Kie estas du A-
oj, vi trovos tri vidpunktojn.

Sed ĉsi volonte ricevas
ankaŭ kelkajn plej popularajn
proverbojn en la norvega aŭ
alia nacia lingvo - kun E-
traduko. Adreso: Pola Radio,
Esperanto-redakcio, 00-950
Varsovio, Skrytka 46, Polen.

For de helt nye



La birdo estas cikonio. La cikonio flugas super la piramido. Ĝi flugas per la flugiloj.

På norsk er det ingen likhet mellom ordene vinge og fly. Men se på ordene på esperanto: flugi og flugilo!

-il er et suffiks som brukes til å lage ord som betegner redskap og middel.

Skribi = å skrive. Skribilo er altså alt man kan skrive med. Tranĉi = å skjære, tranĉilo = kniv. Tondi = å klippe. Hva heter saks?

Mi hakas per hakilo. Haki = å hugge.

Fosi = å grave, kudri = å sy, detruĵi = å ødelegge, ludi = å leke, segi = å sage, sonori = å ringe. Lag ordene med -il, og finn ut hva de betyr.

Man legger merke til at -il ofte kan gi en upresis betydning, slik som i skribilo. Andre slike ord er manĝilo og pafilo. Manĝi = å spise, pafi = å skyte. Manĝilo kan være både kniv, skje og gaffel, pafilo kan være alt fra kanon til revolver. Lumilo kan være fakkellampe, lampe og stearinlys.

Slå opp og finn ut hva disse ordene betyr: voĉdonilo, dormigilo, pruvilo, kovrilo, kuracilo, kolorigilo, pentrilo, ilaro, ilkesto.

JHR

AĈETU KAJ PRAKTIKU!

Esperanto en dialogoj, lernolibro nur en Esperanto, de Andrzej Pettyn, 420 p. A5, 66,-

Ludkartaro: "Ludi kaj lerni" 20 kr.

Anekdotaro "Penetre tra jarcentoj" 70 p. 25 kr.

Albatroso, alarmo kaj algoj

Tute ne estas koincido, ke la tri substantivoj en la titolo de ĉi tiu artikolo komenciĝas per al. Samideano turnis sin al mi, petante, ke mi respondu "naivan demandon", kiel ĉi mem diras: "Ĉu ĉiuj vortoj komenciĝantaj per al devenas de la prepozicio al?" Ĉi mem diras, ke tio ne ĉajnas ebla ĉe alkoholo, sed eble ĉe alarmo. Kaj ĉi estas tute prava!

Esperantistoj efektive estas aŭ povas esti kapablaj trapenetri la preskaŭ diafanan etimologion de alarmo. La vorto originas el la itala, kie all'arme signifas "al la armoj" (= al la armiloj). La radikon arm oni retrovas en armeo kaj armistico.

En alkoholo al estas la araba difina artikolo, kiel en multaj "fremdvortoj". La dua ero de la vorto estas kohl (= antimono), hebree kahál, per kio oni kolorigis palpebrojn (vd. Jeĥezkel 23.40).


Alhambro estas belega maŭra palaco en Granado, konstruita de araboj, kaj la nomo signifas "la ruĝa [kastelo]",

pro la koloro de la sunsekigitaj brikoj de la ekstera muro.

Algebro signifas "kunigo", t.e. de la disigitaj eroj de la ekvacio.

Tiaj vortoj povas ĉsanĝiĝi pro eraraj ide-asocioj. Tiel oni ekzemple vane serĉas en latina vortaro la vorton admiralo. Kvankam ĉgi sonas latine. La vorto devenas de araba vorto amir-al-rah, = ĉcefkomandanto pri transporto. Poste oni ja tie facile pensis pri la verbo admiri, kaj nova vorto ekestis.

Simile la birdnomo albatroso suferis ĉsanĝon. La



ALBATROSO

portugala alcatraz signifas kormorano, variaĵo de alcatruz, kiu estis la sitelo de akvorado, el arabe al-qadus = akvoĉerpa maĉsino. Oni origine uzis la vorton pri la pelikano, kiu estas "akvoportanto" pro sia bekpoĉso. Pro la blanka koloro de la birdo kaj la latina vorto albus (= blanka) la vojo ne estis longa al la formo albatross.


Jen ni atingis alian vorton komenciĝantan per al: albus. Tio estas la vira genro de la adjektivo, kies neŭtra formo estas album. Blankpaĝa libro ekhavis la nomon albumo, kiu origine estis blanka tabulo, sur kiun oni metis oficialajn komunikojn de la pontifiko aŭ de la pretoro.

Aliaj samdevenaj vortoj estas albumeno, kiu estas amelriĉa histo, la manĝebla parto de la grajno, albumino, kiu konsistigas la ovoblankon, albino, kiu estas besto aŭ homo, ĉe kiu mankas la haŭta kaj hara pigmento, pro kio ili havas sangoruĝajn okulojn.

La algoj havas sian nomon de hindeŭropa vortradiko *el-, *ol, kiu signifas putri, kaj kiu parencas kun la norvega adjektivo ul (= ranca), la verbo ulme (fuzi, kaĉbruli) kaj la fiĉsnomo ulke (= ĉoto).

Esperanto havas la vorton alia, la saman, kiun la latina havas. El tiu radikoj devenas alibio, ĉcar en la latina ibi signifas "tie", kaj alieno (demenca, freneza). Alegorio kaj alergio estas el la sama familio, sed grekdevenaj. Agora estis la nomo de la helena urba placo, kaj la verbo agoreuein signifas "paroli al la publiko".

Alegorio do estas "paroli" prio (ĉsajne) alia". En la jaro 1871 doktoro Westphal, la unua, kiu priskribis alergion, kreis la vorton, uzante la grekan substantivon érgon (= laboro), kiun oni retrovas en ekz. energio kaj en la nomo Georg (= farmisto, ĉcar ge = tero, kp. geo-



ALGO
(*Polysiphonia violacea*)

grafio, geologio, geometrio).

Interese estas, ke vi retrovas la radikon ali en du germanaj geografiaj vortoj. La unua estas la nomo de la ĝermana tribo alemanoj, kiuj donis al la francoj la nomon Allemagne pri Germanujo. Verŝajne la vorto signifas "aliaj viroj", t.e. fremduloj). Alia franca kaj germana vortoj estas Alsace kaj El-sass, kiuj devenas de eli-sazzo ("ali-sida", t.e. loĝanto de la alia riverbordo).

Alberto kaj Alica ambaŭ komenciĝas per al. Alica estas mallonga formo de Adelaide (germ. Adelheid), kie oni facile rekonas Adal (= nobelo), dum -heid signifas "persono". Same en Adolfo, kiu signifas "nobela lupo", ĉar lupo estas Wolf en la germana (cetere la sama vorto kiel Esp. vulpo). Alberto estas Adalbert, kie oni redonas adel, kaj bert estas la sama vorto kiel la angla bright (= luma), kiun oni retrovas en aliaj nomoj: Gilbert, Herbert, Hubert.

Alexander havas tute alian originon. Analizante la nomon, oni rapide trovas la elementon ander, kiu estas la genitiva formo de anér (= viro). Norvego kun la nomo Nordmann (= norvego) siatempe uzis tiun helenan vorton por krei al si pli dignan nomon, Arctander. Kaj en sciencaj vortoj oni trovas andro- kiel virseksan prefikson. Poli-andrio estas la stato de virino, kiu samtempe havas plurajn edzojn. La verbo alexein signifas "defendi". Do Aleksandro signifas "defendanto de viroj", vir-defendanto".

Aliqatoro estas misformo de hispana el lagarto, mallongigo de "el lagarto de Indias" = la lacerto de (okcidenta) Hindujo.

Fine: alianco. Jes! Jen la prepozicio al! La deveno ja estas al-liqi. Tial la francoj povas nomi la edzringon alliance!

Johan Hammond Rosbach

Mortis

Kristian Wærås, Fredrikstad (somere). Membro ekde 1961.

Oddmund Rykkvin, Grupo Esperantista de Trondheim (19.11.1993). Membro 1944-90.

Bergljot Vik, Kristiansand (nov./dec.). Membro ekde 1933.

Novaj libroj en la vendobretaro

Etimologia vortaro, tria volumo, K - M, de Ebbe Vilborg. Malmö 1993. 128 p. 24 cm.

Astrid Lindgren: Emilo de Smolando (orig. "Emil i Lönneberga). Trad. Harold Brown kaj Kerstin Rohdin; lingve kontrolis Ebbe Vilborg. Motala 1993. 72 p. A5. ►

Kaj ni memorigas pri:

Zlatko Dizdarević: Rakontoj pri Sarajeva sieĝo 80 p. 24 cm. 95 kr. (Vd. N.E.5, p.23.)

Boris Kolker: Vojaĝo en Esperanto-lando, perfektiga kurso de Esperanto. Moskvo 1992, 340 p. ĉ 100 kr.

Ordbok svenska-esperanto. Ebbe Vilborg. Malmö 1992. Bindita. 478 p. (vd. cetere E-nytt 1/92, p.2)

La anekdotaro "Penetre tra jarcentoj", kiun ni ricevis grandstoke de Estonio kaj vendas por po 25 kr.

Unumane, romano de Johan Hammond Rosbach, 125 p. 80 kr.

Ludkartaro: "Ludi kaj lerni" 20 kr.



Silka kuseno, novelaro de Johan Hammond Rosbach, 1991, 64 p. 55 kr.

Nova traduko de la evangeli-
oj, de Gerrit Berveling, kun
enkonduko kaj notoj:

La bona mesaĝo de Jesuo
- laŭ Marko, 64 p., 47 kr.
- laŭ Mateo, 84 p., 47 kr.
- laŭ Luko, 90 p., 47 kr.
- laŭ Johano 90 p., 47 kr.

LASTMOMENTE

Ĉina Radio sendos kurson pri la ĉina lingvo ekde 5.1.94, merkrede, kun ripeto ĵaude. 50 lecionoj. Ni havas la tri unuajn en nia oficejo.